


SUPERANCIA STELO



Bulteno de la Federacio "LANGUEDOC-ROUSSILLON"

Jarabono: 30 F

al Fédération d'Espéranto du Languedoc-Roussillon


CCP 956-28 P Montpellier - N° 126 - 3a kvaronjaro 1993 -



Post la Universala Kongreso en Valencio (1863 aliĝintoj el 65 Landoj), la UK de 1994 okazos en Azio por la tria fojo. France-Esperanto organizos karavanojn al KOREIO. En 95, la UK okazos en Tampere (Finnlando).

En 93 la Nacia kongreso okazis en PAU...apud la montaro;

En 94 ĝi okazos en nia federacio apud la lago de THAU...apud la maro... (en 95 en Parizo - Eŭropa kongreso).



NACIA KONGRESO 94

La Federacio Langvedoko-Rusiljono invitas vin al la 86-a Nacia Kongreso en **AGDE**, la nigra perlo de Langvedoko, apud la Mediteranea maro, je Cielirado 94 (11-a ĝis 15-a de Majo).

La urbo estas facile atingebla per aviadilo, rapidtrajno TGV, aŭtoŝoseo...aŭ la kanalo de la du maroj ("La Kanalo de la Sudo").

AGDE estas la dua plej malnova komunumo en Francio, enkalkulas 20.000 loĝantojn en vintro sed multe pli (la dekoblon) en somero. Kun pli ol du milionoj da vizitantoj en la jaro, el tuta Eŭropo, ĝi estas unu el la plej turismaj en la lando. Ĝi konsistas el 4 partoj: Agde, kun 13.000 loĝantoj, fondita de la Grekoj antaŭ 2500 jaroj, kie ni kongresos, la havenoj Grau d'Agde kaj La Tamarisière kaj la nova sed jam fama Cap d'Agde.

Antaŭ la kongreso disvolviĝos en Agde la **kutima lingva staĝo**, tiel eblos pasigi tutan semajnon en esperantista etoso. La **loĝeblecoj** estas diversaj. Ekzemple en fericentro la ĉiutaga pensio kosto malpli ol 200 F; toldometoj, ekipitaj por 4 personoj, estos lueblaj por 150 F po tago. Familioj kun infanoj povos elekti inter diversaj okupoj kaj vizitoj.

Ĉiun posttagmezon estos proponataj **ekskursoj** por malkovri la ĉirkaŭaĵojn. Aldone al la loka kaj internacia kuirarto, vi havos la okazon gustumi niajn vinojn, ne nur la konatajn ruĝajn vinojn, sed ankaŭ la blankajn vinojn por akompani la ostrojn kaj mitulojn de la lago de Thau, la muskatvinojn kaj la plej malnovan ŝaumvinon "Blanquette".

Ni navigados trankvile sur la "kanalo".

Car Esperanto estas la lingvo de amikeco, ni omaĝos en Sète, je dudeko da kilometroj, al la kantisto de amikeco **Georges Brassens** per muzika spektaklo.

Tuttaga ekskurso ebligas al vi malkovri malpli bone konatan parton de nia regiono, kie kreskas vitoj, kie kavernoj profundas kaj kie la pasinteco vivas.

Ekde novembro vi povos disponi pri aliĝilo, informiloj pri loĝado, ekskursoj, vizitoj por infanoj, ktp.

"La nigra perlo" kuŝas sur la plej suda vulkano de Francio, kiu ardis antaŭ 700.000 jaroj! Varmos la etoso dum la venonta nacia kongreso! Rezervu kelkajn tagojn aŭ kompletan semajnon meze de Majo 1994 en Langvedoko. **Ĝis!**

La kongresa komitato.

(El "Franca Esperantisto")



AGDE
VILLE GRECQUE
SA CATHEDRALE FORTIFIEE
SES PLAGES
SES MUSEES



AGDE-SETE 94

86-a NACIA KONGRESO

La Federacio Langvedoko-Rusiljono invitas nin al la 86-a Franca Kongreso en AGDE, la nigra perlo de Langvedoko, apud la Mediteranea maro, je Ĉielirado 94 (11a ĝis 15a de majo).

Antaŭ la kongreso disvolviĝos en Agde la kutima lingva staĝo, tiel eblas pasigi tutan semajnon en esperantista etoso. Ĉiun posttagmezon estos proponataj ekskursoj por malkovri la ĉirkaŭaĵojn. Ni navigados trankvile ĝis Sète, laŭ la Kanalo de la Sudo kaj la Lago de Thau. Ni omaĝos, en Sète, al la "kantisto de amikeco" Georges BRASSENS per muzika spektaklo. Dimanĉe 15an, tuttaga ekskurso: Corbières, Carcassonne, Cathares ebligos al la kongresanoj malkovri parton de nia regiono kie kreskas vitoj, kie kavernoj profundas, kaj kie la pasinteco vivas.

"La NIGRA PERLO" kuŝas sur la plej suda vulkano de Francio, kiu ardis antaŭ 700.000 jaroj!.. Tial varmos la etoso, dum la venonta nacia kongreso! Ĝis majo 1994!

Pourquoi une partie de SFS ne serait-elle pas en français? Pourquoi n'y-at-il pas d'articles bilingues pour les débutants? Ce sont des suggestions entendues récemment. La réponse est multiple: SFS est un bulletin d'informations pour les espérantistes de la région; par ailleurs, des textes en deux langues augmenteraient le nombre de pages et les frais d'envoi ou diminueraient le nombre d'articles. Une solution serait d'avoir recours à un autre système pour l'envoi (comme supplément de Franca Esperantisto) et de recevoir des articles déjà prêts...

Puisque nous parlons des frais, sur les 30F de l'abonnement, plus de la moitié part... à la Poste, qui ne nous fait pas de cadeaux. C'est dire que nous ne recherchons pas le profit. Un nombre inhabituel de négligents a "oublié" cette année de régler ces 30F. Ils reçoivent un dernier rappel. Le dévouement et la patience ont des limites.

Vous trouverez dans ce numéro des suggestions, si vous voulez entendre ou pratiquer la langue internationale. Nos lecteurs ont participé à différentes rencontres cet été et leurs comptes rendus (en nombre inhabituel) vous permettront de voyager dans votre fauteuil des bords de la Méditerranée à la Russie (l'an prochain jusqu'en Asie). Vous verrez aussi que quelques groupes sont actifs. Si vous êtes espérantiste isolé(e), pourquoi ne pas les rejoindre ou les aider de temps en temps?

Vous trouverez les tarifs des cotisations et des abonnements pour 94. L'espéranto est l'affaire de tous; l'action doit se faire à plusieurs niveaux. Le niveau local est la base indispensable mais ne suffit pas.

Comme vous le savez, nous recevrons dans quelques semaines le Congrès National. Un Congrès bien suivi est une bonne publicité pour l'espéranto. Nous comptons sur votre soutien, c'est à dire votre présence mais aussi votre participation aux différentes tâches (voir p.3 l'appel aux traducteurs).

Nous mettons actuellement au point le programme de ce congrès; vous le découvrirez dans les prochains numéros. Le tourisme tiendra une large place mais il y aura aussi deux soirées à Agde, une culturelle, l'autre musicale, sans parler d'un spectacle à Sète, en hommage à Brassens. Il est bien sûr possible de ne participer qu'à une partie du congrès.

De plus, comme le stage habituel d'Ascension se déroulera juste avant le Congrès, également à Agde, il sera exceptionnellement possible de passer une semaine complète en Espérantie. Informez vos amis de ce congrès. Une partie du programme est accessible aux débutants et même à ceux qui ne parlent pas (encore) espéranto.

Alors, à bientôt à Agde et Sète!

Pour l'instant, bonne lecture de SFS. Nous restons à votre disposition si vous souhaitez de plus amples informations sur un point mentionné. Nous attendons aussi vos rapports (avant le 19/12, merci!) sur vos actions pour l'espéranto, vos lectures, etc, vos propositions. ~

Esperanto estas ĉies afero!

J.H.

Aŭtuna Kunveno.

Cijare nia aŭtuna kunveno okazis en la fericentro "Batipaume" de Agde. De pluraj jaroj la grupo de Béziers okazigas tie staĝon je Cielirado. Tie komenciĝos la Nacia kongreso en 94, tuj post la staĝo, kaj parto de la kongresanoj loĝos kaj manĝos tie. Dudekses personoj ĉeestis, el la diversaj grupoj kaj departementoj de nia federacio. Kelkaj ne povis partopreni kaj senkulpiĝis. Vizitis nin ukraina amiko, kiu post la kongreso de Valencio restis en Perpignan por scienca serĉado.

Du partoj en la tagordo: federaciaj aferoj kaj preparado de la nacia kongreso. **Federacio:** Ni aŭskultis raportojn pri la semajnoj de Habère-Poche kaj Sète, pri diversaj kongresoj kaj pri la lastaj forumoj de asocioj (en Béziers kaj Montpellier). Ni gratulas la organizintojn kaj partoprenintojn de la diversaj aranĝoj. Ni eble partoprenos la forumon de Agde kaj la renkonton de la minoritataj lingvoj en Mende. SFS: la respondeculo J. Hénin plendas pro la nerespekto de la limdato, tio estigas problemojn ĉiufoje. Li ankaŭ intencas rezigni kiel prezidanto post la nacia kongreso. Federacia kongreso: en 94, ĝi okazos aŭtune, ĉar la organizado de la nacia kongreso estos nia ĉefa okupo printempe.

Kongreso 93: la financa bilanco estas deficitata, malgraŭ kontentiga partopreno. prelegvojaĝoj: la nuna sistemo ne kontentigas; ni rekontaktos la bulgaran samideanon. J. Hénin proponas, ke la grupoj interŝanĝu homojn por prelegoj, projekcioj, ktp. Subvencijetoj: Plurnivele. Ni petos subvenciojn, eble ni rikoltos ion!

Nacia kongreso: Informoj aperos regule en SFS kaj "Franca Esperantisto". La lingva staĝo disvolviĝos de sabato la 7a de Majo ĝis la 11a matene (en Batipaume/Agde). La nacia kongreso sekvos :de merkredo la 11a de Majo posttagmeze ĝis dimanĉo la 15a vespere. Ni elektis la kongresan komitaton; en ĝi estas reprezentantoj de la federacio, de la grupoj de Béziers, Montpellier, Nîmes. Kompletigas ĝin bonvolemuloj, kiuj helpas antaŭ kaj dum la kongreso. Ni disdonis la taskojn farotajn. Pri gastigado kaj kunvensalonoj ne estas problemo. La programo dependas de pluraj respondoj. Grandlinie, ĝi estos tia: merkredon, la 11an de Majo posttagmeze: akcepto, vizito de la urbo, ekzamenoj, interkona vespero. Jaŭdon, la 12an: matene, kunvenoj; posttagmeze, ekskursoj; vespere: kultura vespero. Vendredon, la 13an (!): same kunvenoj matene kaj ekskursoj posttagmeze, muzika vespero. sabaton, la 14an: kunveno ĝis la 10a; poste navigado laŭ la "Kanalo de la sudo" kaj la lago de Thau ĝis Sète kun tagmanĝo surŝipe (nur 80 sidlokoj, aliĝu frue!), vizito de la urbo kaj spektaklo omaĝe al G. Brassens kun la partopreno de E°-Girondio kaj ĵazbando el Rodez. La programo de tiu tago tamen dependas de la salono (konsento de la urbestro de Sète). La dimanĉa ekskurso promeniĝos nin tra Corbières kaj Minervois al Carcassonne. Ni esperas, ke la nacia kongreso allogos multajn esperantistojn kaj plaĉos. **Multe restas fareda kaj decidenda.** Inter aliaj aferoj, ni alvokas al tradukemuloj por pretigi dokumentojn por la kongresanoj. Ni kunvenos denove la 7an de Novembro en Béziers ekde la 10a horo kaj ankaŭ post la tagmanĝo. Helpemuloj estas kore invitataj partopreni. Sin anonci al la sekretario (tel. 68 55 51 77) aŭ al la kasistino (tel. 67 71 05 79). Loko de la kunveno: *Maison des Associations*. Gis!

C.G.+ J.H.

Aldone al la raporto, jen listo de preparotaj dokumentoj. Ni volonte provizos vin je broŝuroj, libretoj, ktp. Agde (historio), la kanalo de la Sudo, Ensérune, Pèzenas, la lago de Thau, Sète, Béziers, Carcassonne, Minerve kaj la Kataroj (teksto de la Muzeo Hurepel), Brassens, la vinoj de Langvedoko, ktp.

Dua aldono: laŭ la sugesto de S-ino Gaussen, dum la kongreso eble okazos en la urbo Agde ekspozicio de infandeseĝnaĵoj el diversaj landoj pri la temo "maro". Ni petis salonon.



La cikonio denove vizitis nian regionon kaj alportis filinon Claudine al A. kaj C. Cayzac kaj nepinon (la unuan) Chloë al A. kaj J. Hénin. Gratulojn al la feliĉaj gepatroj kaj geavoj! Feliĉan longan vivon al la knabinoj! Kun la naskiĝoj menciitaj en la lastaj bultenoj, ni ne plu timu pri la estonto de la esperantistaro!



El aliso pri kolokvo okazonta en Mende (Temo: la ins-tuado de regionalaj lingvoj al getraloj).

Basque
Catalan
Breton
Français
Gascain
Normand
Picard
Provençal
Santongois
Savoyard
Wallon



Vivo de la grupoj

30 N I M E S

Dum la lasta somero, S-ino Gausen akceptis 13 eksterlandajn esperantistojn, speciale post la kongreso de Valencia. Inter ili, Pola instruisto, respondeculo de la nova gazeto "Mono", Ĉinino, Usonano, ktp.

Se vi ankaŭ pretas gastigi esperantistojn, speciale junajn esperantistojn, fariĝu membro de "Pasporta Servo". Informoj haveblaj ĉe SFS.

34 B E Z I E R S

Post ripozo dum Julio kaj Aŭgusto, la grupo iom post iom vekigas. La 18an de Septembro okazis la "Aleoj de Asocioj". Ni dankas S-ron Peray, kiu multe laboris por prepari la budon (dekstre: parto de la budo). Multaj personoj vizitis la Aleojn kaj ni havis sufiĉe da gapantoj, inter kiuj pluraj interesiĝis kaj deziras lerni la Internacian Lingvon. Espereble ili efektivigos sian intencon. La venontaj kunvenoj okazos:

Sabaton, la 9an de Oktobro

Sabaton, la 30an de Oktobro,

kiel kutime je 14h30 en Maison des Associations. Ne eblas kunveni en Novembro: ĉiuj ĉambroj estos okupitaj. Pro tio 2 kunvenoj en Oktobro.



Sabaton, la 11an de Decembro okazos la Zamenhofa Tago ekde la 11a horo, komuna manĝo, poste distra parto. Ni indikos precizan programon al la klubanoj, la 30an de Oktobro. Ĉiuj eksterurbanoj estas kore invititaj. Tiuj, kiuj deziras partopreni, povos nin kontakti antaŭ la komenco de Decembro. Tel. 67 31 13 18.

Staĝo: ĝi okazos antaŭ la Nacia Kongreso de UFE, en la familia domo Batipaume de Agde, de la 7a ĝis la 11a de Majo. La 2 periodoj estas sinsekvaj sed tute sendependaj. Do vi povos partopreni la staĝon sed ne kongresi, aŭ partopreni la staĝon kaj la kongreson, despli bone, restante samloke. Kia agrablaĵo!

M O N T P E L L I E R

Forumo de Asocioj: De la 9a ĝis la 19a horo, la 12an de Septembro, sub blua kaj poste griza ĉielo, sed feliĉe sen pluvo, ankaŭ sen verda esperanto-banderolo, meze de 1100 aliaj asocioj el la 2300, kiuj ekzistas en Montpellier, oko da geesperantistoj prezentis la kutimajn kolorajn panelojn same kiel gazetojn, revuojn, librojn (pri propagando, instruado aŭ literaturo) kaj sonkasedojn. Samtempe, ili disdonis 195 faldfoliarojn, kiuj konsistis el 3 dokumentoj skribitaj en la franca lingvo:

- a) "et si nous parlions espéranto?" (se ni parolus esperanton?)
- b) "l'espéranto à Montpellier" (esperanto en Montpellier)
- c) "le premier rendez-vous" (la unua rendevuo).

Ni parolis kun kelkaj interesatoj izolitaj kaj rilatis kun:
-Nacia sindikato de instruistoj, lernejoj- kaj kolegi- profesoroj (SNUIPP en la franca)
-Instituto pri Eŭropo (tre masimila al la Domo de Eŭropo, kaj multe pli aktiva kaj efika laŭ iu deĵoranto de tiu instituto), en la franca IRRCE
-Jean Cournuejous aŭ Jean Saint Rome, fondinto de la Domo de Eŭropo, kiu devis poste foriri el tiu asocio, puŝita eksteren de la urbestro (almenaŭ li tiel diris).
Ni kontaktis tiujn asociojn kaj homojn kaj esperas, kiel ĉiujare...

La grupo kunvenis la 6an de Oktobro, je la dato de presado de tiu-ĉi numero.

48 + 12

Pluraj esperantistoj haltis en La Canourgue, inter ili Rusino kaj Angloj. En Mende liceano mirigis sian klason, kiam li rakontis, ke dum unujara restado en Mek-sikio por pliperfektiĝi en la hispana lingvo, li ankaŭ eklernis esperanton en tiea liceo. Fine de Oktobro okazos en Mende renkonto de la "minoritataj lingvoj" de Eŭropo. En Rodez la grupo partoprenis la kutiman "tagon de malfermitaj pordoj" de MJC.

66 PERPIGNAN

Car Perpignan estis sur la vojo al la kongreso de Valencia individuaj esperantistoj kaj karavanoj haltis ĉe ni*
 La ĝenerala kunveno de la kultura centro okazis la 21an de Septembro en la sidejo. Kursoj: **Kiel kutime** Sro Bénazet gvidos la perfektigan kurson ĉiumarde je la 17a horo. Ekde nun li ankaŭ gvidos mezan kurson antaŭ la perfekta kurso. Pri la unua kurso, tio dependos de la mendo (Sro Gérard-Voinçon).
 Sep esperantistoj el Perpignan partoprenis la aŭtunan tagon de la federacio en Agde; du grupanoj partoprenis la Universalan Kongreson.
 Japanaj esperantistoj skribis al ni pri la ĝemeliĝo de sia departemento kun la nia. Rapida interŝanĝo de donacoj en Park-Hôtel okaze de manifestacio.

* Haltis en Perpignan dudek hungaraj geesperantistoj, tri Norvegoj, unu Germano, ktp...eĉ nia federacia prezidanto!

En la lasta SFS ni petis informojn pri prelego okazinta en Bourg-Madame. La organizintino sendis detalojn:

*"Ne multaj homoj venis, sed el la dekduo, pluraj petis, ke mi faru kurson, kaj ankaŭ juna ĉeestanto, la ĵurnalisto de loka gazeto "Le Petit Cerdan", tre interesiĝis kaj telefonis poste plurfoje. Kun lia helpo, mi starigas novan prezenton de la prelego: ĉiĉfoje vespere kaj kun pli granda anoncado. Ĝi okazos la 15an de Septembro en la samaejo kiel la unuan fojon. Post unu semajno komenciĝos kurso senpaga, por kiu mi uzos memfaritan metodon en la komenco kaj poste...mi vidos. Jam 4 homoj skribis al mi el Hispana Katalunio por la kursoj; tial mi gvidos la kursojn trilingve: en la franca, en la kataluna kaj en E°..."
 Gratulojn al nia samideanino kaj bonan sukceson al sia originala provo!*

Provenco

Staĝo okazos en Carpentras la 9an kaj 10an de Oktobro; 3 lingvo-niveletoj. Informoj estas haveblaj ĉe SFS.

La Provenca Federacio organizos lingvan staĝon en la junulgastejo "La Rochette" en Manosque, la 16an kaj 17an de Oktobro. (E° Vaucluse mencias la 23an kaj 24an de Oktobro, sed certe temas pri eraro).

Eblas informiĝi telefone ĉe 92 72 39 89 aŭ 90 67 39 31. Aliĝilo estas havebla ĉe SFS. Ankaŭ tri kursoj; la unuagradan gvidos Marie Hunninck, la duagradan Patrick Lagrange kaj la triagradan Georges Lagrange.

Avignon: la 15a Zamenhofa tago okazos en La Souvine je dimanĉo, la 12a de Decembro. Prelegoj je la 10a horo kaj je la 14a (la dua pri vivo kaj protektdado de kastoroj)

Aliĝkotizo: 30F Tagmanĝo: 80F
 Informoj haveblaj ĉe SFS aŭ E° Vaucluse, Centre culturel "La Charité", B.P.113
 84024 Carpentras Cédex.

Toulouse

La 2a de Oktobro estis elektita kiel "ago-tago" por la esperantistoj (ne nur en Tuluzo). La loka centro decidis enketi surstrate pri Esperanto; Kion homoj opinias pri la lingvo-problemo? Kion kaj kiom ili scias pri Esperanto, ktp? Eble pli da informoj pri tiu enketo en la venonta SFS.

se connaître sans que les petits soient écrasés par des grands, et sans que les langues nationales soient mises en danger. En plus la maîtrise de l'espéranto exige 7 à 10 fois moins de temps que n'importe quelle autre langue et améliore les performances de sa propre langue ainsi que l'apprentissage ultérieur des langues étrangères, pouvait-on lire dans les brochures distribuées par le Cercle biterrois de l'Espéranto qui dispense des cours gratuits tout au long de l'année.

66

Vive la langue internationale!

22/7/93
L'Indépendant

Du nouveau plutôt sympa pour les nuits que l'on espère chaudes à Saint-Cyprien. Le Jagger's pub situé place Maillol vient d'ouvrir et propose dans une ambiance rock des soirées franchement décontractées. Ainsi vous pouvez découvrir ce pub à bières et à champagne (!) qui dans son prospectus de présentation indique que la direction manie avec facilité et dans l'ordre, l'anglais, l'allemand, le hollandais et la langue... internationale! C'est en effet assez rare les polyglottes.

"La Marseillaise" (30 IX 93) raportis pri la lasta forumo de la asocioj en Béziers; unu paragrafo estis pri la internacia lingvo.

Une idée de jeune

C'est l'espéranto! En effet Louis-Lazare Zamenhof a eu l'idée d'une langue sans exceptions grammaticales, simple à prononcer, facilitant au maximum la communication entre les nations diverses dès son enfance. Pendant ses études, il a mis au point l'espéranto qui n'arrête pas de progresser depuis plus de cent ans. Cette idée de jeune doit permettre à tous les peuples de

Renseignements pour Béziers aux 67.31.13.18 ou 67.31.13.46 et pour Saint-Chinian au 67.38.03.52.

Esperantistoj partoprenis en

Valencia:

Ne eblas raporti en kelkaj linioj pri la Universala Kongreso de Valencia: 1863 kongresanoj el 65 landoj; multaj diversaj kunvenoj, prelegoj; riĉa kultura programo; partopreno de junaj homoj el Orienta Eŭropo kaj Katalunio... Kompreneble la plezuro trovi geamikojn kaj konverŝacii kun personoj el ĉiuj mondpartoj. Estas substrekinde, ke ĉiuj departementoj de nia federacio estis reprezentataj. La ekstera temperaturo restis inter 35 kaj 40 gradoj! Iom ĝenis min la fakto, ke multaj modifoj de la programo maltrafigis al mi programerojn. Pli ĝenis min, dum vojaĝo postkongresa tra Iberio, la lingva problemo pro la dialektoj. Tiu problemo restas aktuala!

John Wells, Prezidanto de UEA, komparante paeljon kaj la esperantan idealon klarigis: "Kiu volus, nome de iu "pureco", uzi nur unu el la nepraj ingrediencoj, tiu fiaskus. Same la popoloj formu unuecan tuton gardante sian identecon!"

Sur la lasta paĝo de la antaŭa SFS vi trovis receptojn de la hispana kuirarto; jen la kvantoj de la ingrediencoj uzitaj por la giganta paeljo, kuirita por 2000 personoj je la komenco de la UK. Se vi invitos 200 aŭ 20 personojn, kalkulu proporcie dekone aŭ centone!

Bonan apetiton!

J.H.

La diametro de la pato estis kvar metroj, la pezo 1000 kilogramoj. Por la fajro oni uzis 600 kilogramojn da oranĝarba ligno.

La ingrediencoj de la paella estis la jenaj.

180 kg	da rizo	25 kg	da olivoleo
200 kg	da kokido	60 kg	da kuniklo
40 kg	da anaso	20 kg	da helikoj, el la montaro
40 kg	da ruĝa tomato	200 kg	da specialaj verdaĵoj
10 g	da natura safrano	500 g	da papriko
10 kg	da salo	400 l	da akvo

Se multaj kongresanoj venis per aŭtobuso, aviadilo, trajno aŭ veturilo, kelkaj kuraĝuloj biciklis al Valencia. Inter ili Jorgos kaj gejunuloj el Ariège.

Dekstre artikolo, aperinta kun foto en la rubriko "Céret" (sen la enkonduka para-grafo). Ci-poste alia artikolo en la sama gazeto "L'Indépendant" pri vizito en Estagel.

Ni gratulas la biciklintojn.

Avant de passer la frontière pour rejoindre Figueras, ils ont dressé leurs tentes dans le pré d'Ives Gras, l'animateur du Centre international de musique populaire de Céret qui a leur offert un concert de musique (populaire, comme il se doit!) à l'accordéon et à la flûte.

En s'arrêtant dans notre ville, les jeunes cyclistes-espérantistes rendaient hommage à M. Sagéoli, son ancien maire. En 1920, il avait organisé et interprété avec Mme Julia, enseignante, une soirée théâtrale en espéranto qui avait obtenu un grand succès. M. Coste, adjoint au maire, reçut le petit groupe au nom de la municipalité et signa le livre d'or de l'Association d'études espérantistes de l'Ariège.

Tout au long de leur périple, les jeunes, accueillis par les espérantistes locaux perfectionnent la pratique de cette langue universelle tout en découvrant des personnes de culture différente ouvertes à l'échange et au rapprochement entre les peuples. Bonne route aux jeunes porteurs d'espoir...

Une chaîne d'amitié

Pédalons avec l'espéranto!

Chevelu, barbu, Georges Comte ne passe pas inaperçu sur les routes de notre Roussillon... Il est suivi par cinq jeunes cyclistes de 10 à 12 ans. Organisateur en 1987 du Tour d'Europe pour les 100 ans de l'espéranto (20.000 km) et en 1988 pour les 40 ans de la Déclaration des droits de l'homme (10.000 km) avec comme départ commun Céret, notre éducateur spécialisé a eu l'idée de partir de Laroque-d'Olmes (Ariège) le jeudi 8 juillet pour rallier, avec son petit groupe, Valencia, en Espagne (600 km), où se tient le congrès universel d'espéranto. Comme entraînement, ils ont effectué le tour de l'Ariège. Le but de l'opération est de se perfectionner en espéranto, tout en apprenant

à vivre ensemble. Chaque soir, on fait un briefing où l'on apprend à se nourrir, à camper, à rencontrer des amis... Parfois des clubs cyclotouristes ou espérantistes les accueillent. Dans chaque étape, ils font signer leur livre d'or par la mairie ou la gendarmerie. Venant de Quillan, ils se dirigeaient vers Céret, via Millas, la capitale du Vallespir. Guillaume Terris, Edith Bombrun, Raphaël Comte (un chevronné), Guillem et Elisa Garrigues (elle va assister au congrès espérantiste des enfants) tressent ainsi à travers départements et frontières une chaîne d'amitié... Nous ne pouvons que leur souhaiter bonne route sur les chemins de la liberté.

Jean-Claude GARRIGUE



Georges Comte et sa petite troupe lors de l'étape à Estagel sur la fontaine de la place Arago.

Bona novaĵo! Esperantistoj ne plu restas en ombro...

RAPORTO PRI LA INTERNACIA SEMAJNO DE SETE/Ankaŭ pri la semajno de Habère-Poche.

De la 21a ĝis la 28a de Aŭgusto okazis en la agrabla feriejo "La Joie de Vivre" en Haute-Savoie la 18a ISE (Internacia Semajno de Esperanto). Partoprenis ĝin 20 personoj, inter ili 7 eksterlandanoj: 2 Italoj, 1 Svisino, 1 Hungarino, 2 Israelanoj, 1 Argentinano, do pli ol la triono ne estis francaj: vere internacia etoso.

3 kursoj okazis: la unuagrada, gvidita de Marjo Guzzi, sperta instruisto itala; la duagrada, gvidita de Alain Favre, loka esperantisto, kunlaboranto de KCE en La Chaux de Fonds, kaj la superan kurson gvidis Daniel Moirand.

Dimanĉon Alain Favre gvidis la grupon ĉirkaŭ bela monta lago, sub varma suno. Sed ve!

De lundo ĝis sabato pluvis, eĉ pluvegis. Malgraŭ tio, kuraĝuloj vizitis Thonon, Yvoire, Neniens, bela tipa vilaĝo ĉe lago Léman.

La dua ISE de la jaro, sed la 19a de la komenco, okazis en Sète, en Lazaret borde de la maro, de la 4a ĝis la 11a de septembro. Tiu semajno allogis 52 esperantistojn, inter ili 15 ekster-

Les Espérantistes au soleil

CETTE année encore, et pour la 19^e fois, le Centre Culturel Espéranto de Montpellier a organisé la Semaine Internationale au Centre "Le Lazaret" à la Corniche.

Depuis samedi dernier une cinquantaine de personnes des horizons les plus divers ont répondu à l'appel du Dr Vierne, pour se baigner dans ce milieu de culture internationale: il y a là des Catalans, Suédois, Italiens, Anglais, Luxembourgeois, Hongrois et Néozélandais, des Français, d'Aquitaine, Pays-de-Loire, Midi-Pyrénées, Dauphiné, Savoie, Provence, Côte d'Azur, Ile-de-France et quelques-uns du Languedoc-Roussillon.

Le matin et en fin d'après-midi chacun travaille studieusement suivant son niveau:

- les débutants découvrent les rudiments de la langue internationale par une méthode "directe" c'est-à-dire sans utilisation de la langue maternelle puisque les élèves sont d'origines différentes, cette méthode leur est présentée par Carla de Lorenzi, italienne rodée à cette technique puisqu'elle a déjà enseigné dans plusieurs pays,

- pour ceux qui ont déjà étudié l'Espéranto depuis un an ou deux et ont besoin de pratique, le cours de conversation est mis en place par Stefan MacGill, ex-président de la Ligue internationale des enseignants espérantistes, créateur de

plusieurs méthodes d'enseignements pour la communication "en situation" (pour l'Espéranto et pour l'anglais, qu'il enseigne en Hongrie). Il est aussi rédacteur du petit journal des écoliers et jeunes débutants "Juna Amiko". Il prévoit aussi, pour la fin de ce stage, de permettre à plusieurs participants de passer l'examen international de UEA/ILEI. - les Espérantophones confirmés, quand à eux participent à une analyse littéraire de l'œuvre "Hierau! Hodiaŭ, Morgaŭ" de l'ethnologue Bernard Golden. Cette ronde d'étude est dirigée par Pierre Babin qui est venu de Vendée... ou plutôt revenu, puisqu'il fut enseignant à Agde. Il est par ailleurs responsable de la Maison Culturelle Espérantistes - le Château de Grésillon - à Bauge en Maine et Loire où il accueille au printemps et durant tout l'été diverses sessions, stages, séminaires spécialisés dans les domaines les plus divers.

L'après-midi diverses excursions et visites touristiques sont proposées à ceux qui découvrent la région et ne sont pas inconditionnels de la baignade quotidienne: Sète, Pèzenas, Agde, Ensérune...

Pour tout renseignement on peut s'adresser au Dr Y. Vierne, 5 rue Dr Roux 34000 Montpellier tél. 67.54.15.34. et en Midi-Pyrénées G. Gomte, 09120 St-Félix tél. 61.60.86.83.

-landanoj: 3 Hispanoj, 1 Luksemburgano, 3 Italoj, 1 Anglo loĝanta en Germanio, 2 Svedoj, 1 Novzelandano, 3 Hungaroj, 1 Usonano. Ankaŭ ĉi-tiue internacia renkonto.

La tri kursoj estis gvidataj de Carla de Lorenzi, pere de Cseh-metodo, Stefan MacGill kaj Pierre Babin. La staĝanoj tiel bone studis, ke ili deziris trapasi ekzamenojn. "Atesto pri lernado" kaj "Atesto pri praktika lernado" (ekzamenoj de la Franca Instituto) prezentis pluraj kandidatoj. La ekzamenoj okazis sub la respondeco de Jeanine Bony, Pierre Babin kaj Firmin Cayrol. Ni ne konas la rezultojn.

Por la unua fojo en Francio okazis la internaciaj ekzamenoj de ILEI kaj UEA. Do rimarkinda evento. La ekzamenan komisionon konsistigis Pierre Babin, Carla de Lorenzi kaj Stefan MacGill, ties prezidanto. Ĉiuj kandidatoj sukcesis: Andrée Roques en la elementa ekzameno kaj en la meza ekzameno sukcesis Andrée Gaussen, Jacques Grégoire, David Hopper ("bone") Jorgos ("tre bone"), Yvette Vierne ("tre bone"). Posttagmeze ekskursoj vizitigis Pèzenas, Agde, Ensérune. Ventego malebligis la boatan viziton de la lago de Thau.

La tutan semajnon agrabligis la familio MacGill kun ties 2 afablaj knabinoj Karina kaj Hajni, denaskaj esperantistinoj. Eĉ Karina, ne ankoraŭ trijara, demandis, kial plenkreskuloj parolas tiel malbone!

En ambaŭ semajnoj ĉiuj estis ege kontentaj pri la kursoj, la belaj lokoj, la agrablaj domoj, la bonaj manĝoj. Konklude: se vi ne povas longe vojaĝi, sed se vi deziras vivi en Esperantujo, venu en Sète!

Denove gratulojn al Yvette Vierne kaj la grupo de Montpellier pro la bonega organizado de la "Internaciaj Semajnoj de Esperanto".

Mirinde estas, ke tiel eminentaj esperantistoj gvidis la kursojn. Ni ne forgesu la kandidatojn de la diversaj ekzamenoj; gratulojn al la sukcesintoj kaj bondezirojn al tiuj, kiuj atendas la rezultojn.

En 94 okazos nur unu "semajno", en Sète. Atentu la datojn kaj ĝis!



esperanto

bona ideo!

IOM PLI PRI LA SEMAJNO DE SETE:

Kutime ni ne aperigas du raportojn pri la sama evento; ĉi-foje temas pri la raporto de unu el la "staĝintoj", kiu prezentas alian vidpunkton kaj kompletigas la unuan raporton... De la 4a ĝis la 11a de Septembro 1993 okazis, kiel kutime, staĝo en la ĉarma kaj tipa urbo Seto, ĉe mediteranea marbordo.

En la komenco, la partoprenantoj ĝuis kvietan glatan maron, kies ondetoj brilegis sub la arda suno. La baniĝantoj regaligis sin en la malvarmeta blua akvo kaj vere puregatis; tio estas notinda en la nunaj tempoj, en kiuj pura akvo estas trezoro. Ili sunbruniĝis, etenditaj sur la fajna sablo de trankvila strando. Poste ili vidis ŝtormon: la maro koleriĝis, ĝia bildo ŝanĝiĝis; estis terure spekti la ondegojn, kiuj frakasis sin sur la rokojn, sed en tiu regiono malbona vetero ne daŭras, baldaŭ revenis la brila suno.

La familia centro, kiu akceptis la esperantistojn, estis tre komforta, gastigema. Do, la staĝantoj povis bone labori, ĉar ili estis tie por labori! kaj, kredo min, ili trovis la laboron plezuriga, ĉar D-ro Vierende petis de famaj pedagogoj la gvidadon de la tri niveloj. Sro Babin primajstris la trian nivelon, liaj gelernantoj firme prilaboris la verkon "Hierau, Hodiau, Morgau" de Golden. En la dua nivelo, Stefan Mac Gill multe paroligis siajn lernantojn kaj malkovrigis al ili la lernolibron "Tendaraj Tagoj", kies aŭtoro estas Stefan Mac Gill (3 libretoj por infanoj 14-jaraĝaj; 2 estas jam eldonitaj, la tria baldaŭ aperos). S-ino Carla de Lorenzi gvidis laŭ Cseh metodo la kursojn de la komencantoj, kiuj entuziasme ĉeestis ilin.

Entute, 54 partoprenantoj, el kiuj, mirinde, 18 eksterlandanoj el Usono, Svedio, Germanio, Hispanio, Nederlando, Belgio, Italio, Hungario; vidu: estis vere internacia staĝo. Vespere, la staĝantoj distriĝis per multaj amuzaĵoj, kreitaj de ili mem, ili riveligis inventemaj, tiel la scivolo estis ĉiam spronita.

Ekskursoj okazis en la ĉirkaŭaĵoj. La vizititaj lokoj ege plaĉis al ĉiuj kaj ĉiuj intencas reveni en tiun belegan regionon, por viziti pli profunde la trezorojn de la diversaj epokoj de nia historio kaj ankaŭ de la mediteranea civilizacio. Sabate, je la fino, okazis ekzamenoj, sed ĉi-jare estis novaĵo; krom la francaj ekzamenoj 6 staĝantoj trapasis ILEI-ekzamenojn; plena sukceso al ili pruvis la kompetentecon de la instruistoj.

La staĝantoj rendezuis je la Nacia kongreso, kiu okazos en la venonta jaro 1994 je Cielirado, dum la monato Majo, en la urboj Agde kaj Sète.

Legantoj de tiu artikolo, rezervu viajn tagojn je Cielirado por ĉeesti la Nacian Kongreson, vi ne estos elrevigataj.

Je la nomo de la staĝantoj mi dankas Doktoron Vierende pro ŝia grandega laboro kaj ŝia sindonemo al Esperanto; ankaŭ Jorgos meritas kuraĝigon, ĉar li prezentis abundan libroservon. Do, ĝis la nacia kongreso en Agde-Sète.

Unu el la 54 staĝantoj.

Rusio:

De la 14a de Junio ĝis la 21a, profitante turisman vojaĝadon el Tuluzo al Rusio, ni estis ses esperantistoj, dezirante viziti la du urbojn St Peterburgo kaj Moskvo, ne nur turistmaniere, ĉar ni estis atenditaj. Kvar tagoj en St Peterburgo permesis tre bonajn kontaktojn, varman akcepton en la Palaco Jusupov, promenadon dum la "blanka nokto". Kun ni estis ankaŭ neesperantistoj, kiuj miris pri la efikeco de Esperanto.

Nur du tagoj en Moskvo estis tro malmulte, tamen ni povis renkontiĝi kun sep klubanoj, inter ili kelkaj estis jam niaj korespondantoj. Ni akceptis en nia hotelo "Kosmos".

Okaze de la UK en Valencio ni revidis unu el ili, Lev Medvedev, kiu estas tre agema ekologo. Li restadis du semajnojn en Perpignan antaŭ ol foriri al San Marino, kie li prelegis.

Ankaŭ postkongrese venis Ukrajna sciencisto, Jaroslav Matvijsin, de la Scienca Akademio de Kiev. Ĉi-tie li aktive laboris dank'al la arkivoj kaj biblioteko, por pliriĉigi sian serĉadon.

AP + JM.

Hungario:

En ŝanĝigema vetero, tiun komencon de julio, okazis en Veszprem (Hungario) la 9a IMEK (Internacia Medicina Esperanto-Konferenco). Kunvenis el 11 landoj kvindek da sanistoj, plejparte kuracistoj, el kiuj D-roj Imre Ferenczy (H) kaj Wlodzimierz Opoka (PL), respektive Prezidanto kaj Generala Sekretario de Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA).

Post la solena malfermo en la ĉeesto de la vicurbestro kaj la urba hospitalestro, la faka programo, sufiĉe abunda pro trideko da prelegoj plejofte interesaj, ĉiam malpedantaj kaj klaraj, disvolviĝis dum du tagoj. La distra programo konsistis el du vespermanĝoj en la restoracio "Szürke Barát" (t.e. "la griza frato", facila vortludo), dum kiuj ĉiu-eĉ Prof. Makabe plezurigis nin per japana gesta kanto vere impresa-kantis unu aŭ pli da sialandaj popolkanantoj en kompreneble korvarmiga etoso; ankaŭ el gvidata vizito de la malnova urbocentro, kaj el tute suna plentago ĉe la Balatona lago kun vizito de la korhospitalo-sanatorio, naĝado kaj promenada ŝpirado. La regiona ĵurnalo Naplo bone elstarigis la okazaĵon per du nemal-longaj artikoloj, el kiuj eĉ unu sur la titola paĝo.

B.B.

Viviers (Ardèche)

EKUMENA KONGRESO :

Ĝi okazis de la 16a ĝis la 23a de Julio en la urbeto Viviers—en la latina "Vivarium", t.e. nutrorezervejo—ĝi estis fortikaĵo kaj nutrorezervejo por la ĉefurbo de pra-Vivarais "Alba Heleviorum" aŭ "Alba Augusta".

Post ties detruo en la 5a jarcento, Viviers fariĝis episkopejo. La kongreso loĝis en domo de la 18a jarcento. Viviers estas vidinda urbeto; mi malkovris ĝin dum la kongreso. La temo de la kongreso estis: "akceptu unu la alian". Partoprenis proksimume 85 personoj el 11 landoj, ĉefe Francoj, Germanoj, Poloj sed ankaŭ 1 Japano, 1 Malajziano, 2 Hispanoj el la Kanariaj insuloj, Nederlandanoj, Svedoj, 1 Hungaro, 1 Rumanino, 5 pastroj kaj 1 Luterna pastoro.

Ĉiutage ni legis la sanktan Biblion kaj preĝis kune; ni kantis psalmojn kaj laŭdojn polifonie aŭ gregorie. Ni ĉiutage provis en koruso novajn kantojn. Vespere ni denove kune preĝis. Ni provis dancojn el diversaj landoj. Ni multe laboris kaj cerbumis pri dokumentoj por alproksimigi la du religiojn. La etoso estis tiel agrabla kaj varma, la frateco kaj toleremo inter ni tiel grandaj kaj profundaj kaj veraj, ke ni fariĝus fratoj tiel proksimaj, ke neniu povus distingi diferencon inter ni. Tial mi spertis la proksimecon inter niaj du religioj.

La venonta kongreso okazos en Pollando. Mi intencas partopreni kaj revidi miajn novajn multajn geamikojn, kiujn mi ekkonis en Viviers, kaj kun ili mi volas denove sperti proksimiĝon inter niaj du religioj.

A.T.



Supre: Pikniko en Romans.

Parto de la grupo antaŭ la katedralo de Viviers.

Malsupre: 8 homoj el 8 diversaj landoj



Skizo pri vojaĝo al la ok-lando

La kaŭzo de la vojaĝo estis partopreni kongreson de la esperantofederacio de Langvedoko-Rusiljono en la najbaraj okcitanaj teroj la 15an kaj 16an de majo. La katalunan ekspedicion konsistigis deko da homoj el diversaj punktoj de la teritorio, kiel Sabadell, Mataró, Barcelona kaj Vic. La programo inkluzivis diversajn debatojn, el kiuj unu interesega pri la lingvaj malplimultoj kaj la situacio de Katalunio kaj Okcitanio. El ĝi ni rapide eltiris konkludojn.

Tuj montriĝis evidenta, ke la nura paroladon en la okcitana (kiun ĉiuj francianoj el la publiko komprenis) faris la kataluna gasto en prelego pri la lingva situacio sude de Pireneoj. Eĉ la reprezentanto de Institut d'Etudis Occitans prelegis en la franca.

La ega plimulto de la okcitanoj estas anoj de la franca kulturo, kvankam ili havas ioman konscion pri sia deveno kaj defendas sian folkloron (ni jam vidis bonan pruvon en la *Prima de las lengas* unu monaton antaŭe en Tolosa). La okcitanoj ne kuraĝas publike paroli sian *patois* (tiel ili nomas sian lingvon malestime), ĉar ĝi estas malprestiga. La flagon de la lingvoj de la malplimultoj kaj de la ok-afero devis levi la katalunoj.

Alia interesa aspekto estis vidi, persone por la unua fojo, la etoso de kultura kadukiĝo de la francoj. Ĉiuj iliaj intervenoj montris la timegon, kiun francoj havas pri la angla lingvo, eĉ obsede. Ŝvebis en la aero la ideo subteni esperanton ĉefe por haltigi la anglan, pli ol por ĝia karaktero de neŭtrala lingvo neimperisma.

Kataluna Esperantisto 1993/2

La katalunoj oni bone zorgis kiel gastojn kaj estis sentebla ĝenerala simpatio al ni. Multaj okcitanoj atente sekvas la situacion en Katalunio pere de Perpinyà, kvankam la landlima muro estas reala en la mensoj el ambaŭ flankoj de Pireneoj.


La grado de interkompreno inter la lingvoj kataluna kaj okcitana (ĉefe de la langvedokaj dialektoj) estas tre granda. Bedaŭrinde, kaj mi diras tion kun nenia kritikemo, ke en kongresoj inter tiel proksimaj federacioj la uzo de esperanto (pri kio fintine ni ĉiuj kunvenis) ne estas cent-procenta.

Albert Anglada

Pri la Kongreso de Limoux

NDLR: Estis klare indikite antaŭ la kongreso (SFS 124*), ke la publika debato pri regionaj lingvoj okazos en la franca kaj okcitana lingvoj.

Impresoj de kongresarino: "Maje la federacia kongreso en Limoux multe plaĉis al mi, kaj la saŭma vino kun surbotela esperanto-etikedo allogis la fremdajn samideanojn. M. J."



Pasintan oktobron (1992) mi vizitis la regionon Hoggar en la suda alĝeria dezerto SAHARO.

Ni estis nur tri francaj kaj tri svisaj turistoj kun franca gvidanto kaj 3 Tuaregoj: du ŝoforoj kaj unu kuiristo. Ni vojaĝis en du ĉiuterenaj aŭtomobiloj, kiuj kunportis ĉiujn niajn bezonaĵojn.

El Tamanrasset, kiun ni atingis aviadile, ni ĉirkaŭiris tra Djanet la montojn Hoggar kaj Tassili laŭ Tenere, ĉiam akompanataj de blua ĉielo kaj arda suno.

Oni ofte imagas la dezerton kiel serviva, nuda, sabla ebenaĵo, monotona kaj senlima. Sed ni kontraŭe renkontis ĉiarn' pli belajn pejzaĝojn: jen mirindajn okrajn aŭ ruĝajn dunojn, jen altajn nigrajn rokojn kiel mezepokaj kasteloj, jen nekredible eltranĉitajn montokrestojn laŭlonge de ebenaj uedoj.


Kia plezuro dormi sur la varmeta dolĉa sablo, sub la brilantaj steloj, aŭskultante la silenton de la nokto, malofte rompita de birda krio aŭ de musotrotetado aŭ de pepado de kangurumusoĵoj ĉirkaŭ la tendo.

Matene, post la manĝo sur la sablo, ni foriris piede en la pura, ankoraŭ ne varma aero, ĝis la aŭtomobiloj, post ordigo kaj ŝarĝo de la pakaĵoj, prenis nin. Tiam ni serpentveturis inter rokoj kaj arbedoj, kelkfoje je plena rapideco sur ŝtoneta "reg" (sensabla ebenaĵo), bonhumore skutaĵoj sur niaj ne tro remburitaj benkoj, eĉ danĝere saltantaj kiam nia ŝoforo ne ĝustatempe povis bremsi por neatendita truo.

Feliĉe la veturiloj estis solidaj, nur dufoje ni ensablĝis. Ĉiam mi admiris la lertecon de niaj ŝoforoj, kiuj veturis sur netraireblaj vojoj.

Tagmeze ni serĉis lokon por la manĝo, ĉu en la ombro de alta nigra roko, ĉu sub granda akacio post kiam ni tiris el la teron ĝiajn longajn danĝerajn dornojn.

Tiam ni etendis kovrilon kaj tapiŝon por meti sur ĝin la manĝilaron, ĉirkaŭis la matracojn por sidi kaj manĝis trankvile la kunportitajn ŝinkojn kaj kolbasojn el Francio kaj la regionajn fruktojn kaj legomojn, dum la kuiristo ekbruligis la fajron per kolektitaj akaciaj mortaj branĉoj.



Post la manĝo, ĉu ni promenis antaŭ la gravuritaj rokoj aŭ inter la rokegaj fungoj (pluraj ŝajnis morkeloj), ĉu ni siestis momenton, ĉar malgraŭ la "cheche" (ŝeŝe), longa skarpo kiun la Tuaregoj volvas ĉirkaŭ la kapon, la suno tre ardis.

Poste ni veturis pli malproksimen ĝis ĉirkaŭ la 17a horo. Tiam ni serĉis lokon por bivaki, ĉiam proksime de rokegoj aŭ de raraj akacioj aŭ tamarikoj, por uzi ĝin kiel tualetejo. Tamen la tualete kun nur unu litro da akvo en mia kukurbotelo estis vere simpligita.

En la sudo, inter Tamanrasset kaj Djanet, ni renkontis nur unu karavanon de dromedaroj kaj kaprinoj, kaj ĉe unu "guelta" (rara fonto en la dezerto) grandegan gregon de dromedaroj. Ili trinkis la ne tre puran akvon el profunda puto.

Ifoje gazeloj forkuris timeme antaŭ ni. Dikaj sakoĵoj, pendigitaj je unu rara arbo, entenis provizojn de Tuaregoj, atendante ilian venontan trapason.

Sed kia ĝojo suprengrimpinti nudpiede la interplektitajn altajn dunojn, por admiri kun ravo la riĉajn kolorojn de la sunsubiro. Aŭ ĉe la supro de la Assekrem, je 2750 m. de alteco, mediti en la silento de la sunleviĝo, sidante kontraŭ la muro de la kapelo de la Patro de Foucault (Fuko)

antaŭ la montaj pintoj, irantaj el la nebulo.

En Djanet, tuarega familio ĝentile akceptis nin por tagmanĝi laŭ la tiea kutimo. Ni sidis teren sur kuseneto kaj prenis per kulero la kuskuson, viandon, legomojn el la komuna plado. Ili eĉ invitis nin lavi nin en apuda ĉambreto.

Poste, norden, ĝis la Assekrem, ni tamen renkontis 4 aŭtomobilojn de francaj turistoj kaj germanajn junulojn sur motorcikloj, en regiono kie la montoj devigis nin sekvi la ege malbonan serpentumantan vojon.

Nur unu vilageton ni trapasis ĉe oazo kun kelkaj palmoj kaj akvumitaj gardenetoj, sed verdaĵojn ni malofte renkontis.

Antaŭtagmeze ni plurfoje vidis miraĝojn, mirindan insulon, reflektiĝantan en granda lago, la surprizo de la dezerto.

Multajn plezurojn mi ĝuis. Unu el la ne malpli grandaj estis manĝi vespere sub belega luno, kiu sufiĉe lumigis nin (estis la periodo de plena luno) kaj poste aŭskulti apud la fajro, kie varmiĝas la teo, la rakontojn de niaj humuraj Tuaregoj. Veraj romantikaj momentoj.

Tiu sahara ekskurso restos en mia memoro kiel la plej simpatia kaj ĉarma el ĉiuj miaj turistaj vojaĝoj.

M. M. (48)



906 adresoj en 72 landoj. La adresoj estas tiuj de esperantistoj, kiuj konsentas gastigi senpage (laŭ kondiĉoj difinitaj de ili) esperanto-parolantojn. En tiu-ĉi bulteno estas menciataj la vizitoj ĉisomere de junaj eksterlandaj esperantistoj. Eble vi deziras ankaŭ helpi al junaj esperantistoj...en tiu kazo petu aliĝilon de SFS. Se vi jam estas gastiganto, ne forgesu renovigi vian aliĝon antaŭ la la de Decembro. La listo estas ankaŭ aĉetebla (24 NLG ĉe UEA)

ELTURNIGEMAJ Esperantistoj:

Post la UK de Valencio buso da Hungaroj haltis en la junulgastejo de Narbonne por tranokti. Ve! La mendo ne estis valida, ĉar ili ne antaŭ-pagis almenaŭ parte. Feliĉe, esperantistoj el Nîmes helpis ilin trovi litojn en la junulgastejo de Arles

VOJAGI HAZARDE:

Rakontas samideanino el Perpignan: "Kutime mi ne gatis. Sed kion fari, kiam alvenas, la 14an de Aŭgusto je la 24a horo, neanoncita fremdlanda persono, venanta de Madrido kaj ironta al...Ariège, por partopreni staĝon kaj bicikli? Mi gatis ĝin; plurfoje, plurloke mi provis telefoni. Frue anonci staĝon, certe tio estas bona, sed krom la regionon kaj kelkajn telefonnumerojn, ĉu oni povus ne forgesi precize indiki la lokon kaj datojn?"

VOJAGI PERE DE LA ANGLA:

Antaŭ nelonge televidstacio menciis, ke en Usono ĉiu dua persono (alivorte 50% de la loĝantaro) havas problemojn por legi or paroli la anglo-usonon aŭ uson-anglan lingvon. La usona oficejo pri demografiaj studoj anoncis en Junio, ke la etnaj kaj rasaj minoritatoj ^{esras} majoritataj (=plimultaj) en pli ol 2000 urboj aŭ grafejoj; ili estas ankaŭ majoritataj en 6 el la 8 urbegoj, kiuj havas pli ol unu milionon da loĝantoj.

LINGVA DIVERSECO:

estas samtempe pliriĉigo kaj obstaklo, speciale en la internaciaj instancoj kiel la Eŭropa Parlamento. Pro tio la ideo de S-ro Boré de la poŝtkarto ĉi-dekstre. Oni povus imagi similajn kartojn kun mallonga teksto en la 9 oficialaj lingvoj (eble eĉ pli baldaŭ) ekzemple: "Eŭropa komunumo", "Eŭropa unueco", "Eŭropa solidareco", "Interkompreno de Eŭropanoj", ktp. Pri tiu temo, ni balotos en 94 pri Eŭropo. Ni jam pripensu niajn argumentojn!



UMBERTO ECO:

Vidu dekstre tion, kion li deklaris al la redakciestro de "Le Figaro" antaŭ kelkaj semajnoj. Pripensida!

JULES VERNE:

Li favoris nian lingvon sed mortis antaŭ ol finskribi romanon, kie temas pri esperanto. Prokrastite ne estas perditite (proverbo inventita!); tiu romano de J.Verne estas fine eldonita kaj aĉetebla ĉe via librovendisto. La revo de J.Verne efektiviĝis. Afrikanoj ankaŭ parolas la internacian lingvon!

- Cette langue européenne, n'est-ce pas déjà l'anglais ?

- Si on ne parle plus d'une langue « parfaite », mais plutôt d'une langue internationale « véhiculaire », oui, ce rôle est à présent joué par l'anglais. Mais il pourrait s'avérer que demain, dans une Europe unie, chaque pays refusant que la langue véhiculaire soit celle de l'autre, on arrive à accepter l'idée d'une langue véhiculaire artificielle.

- C'est l'utopie de l'espéranto...

- Utopie jusqu'à hier, sans doute. Mais une utopie de ce genre a peut-être plus de chance de se réaliser aujourd'hui. Grâce à la télévision. Avec elle, on peut tout faire. En une seule génération, après des siècles d'incompréhension, elle a permis d'apprendre l'italien aux Albanais. C'est pourquoi ceux-ci cherchent au-

jourd'hui à immigrer en Italie. On ne fera jamais l'Europe si on ne tient pas compte du problème de la compréhension mutuelle. Quand des gens de trois ou quatre pays du Continent se rencontrent, il faut qu'ils puissent communiquer entre eux. Là-dessus, on est tous très en retard. On enseigne les langues sans se soucier de leur importance dans le monde d'aujourd'hui.

- Que voulez-vous dire ?


- En Italie, on enseigne autant le français que l'anglais, et très peu l'allemand. En France, on enseigne exagérément l'anglais, et beaucoup plus l'espagnol que l'italien ou l'allemand. Dans les deux cas, ça ne correspond en rien à la situation du monde dans lequel nous vivons. Je crois qu'il faut savoir respecter toutes les autres langues et maintenir la variété, la pluralité...

AVAIT-IL AUSSI PREDIT LE SUCCES DE L'ESPERANTO?

Jules Verne, ce génial anticipateur qui a prédit dans ses romans l'apparition de tant d'innovations scientifiques, s'est aussi enthousiasmé pour la langue Espéranto, dont le Dr Zamenhof fut l'initiateur à la fin du siècle dernier. En 1903, cet écrivain a accepté d'être le président d'honneur du tout nouveau groupe espéranto d'Amiens, ville où il demeurait. Il avait aussi promis d'écrire un roman où l'Espéranto jouerait un rôle important. Mais la mort va mettre prématurément un terme à ce projet: Jules Verne décède le 24 mars 1905, année du 1er congrès international à

Boulogne-sur-Mer. En 1981, la ville de Nantes se rend acquéreur de nombreux inédits restés dans les archives de l'écrivain. Nantes, où est né Jules Verne, lui consacre alors un musée très intéressant. Ces manuscrits sont actuellement publiés par les soins des "Editions du Cherche-Midi". Et ô surprise!.. on vient de découvrir que l'un de ces textes (en cinq chapitres) n'est autre que le début du roman "Voyages d'Etudes", le fameux roman où Jules Verne mettait en scène l'Espéranto! Il avait imaginé que cette Langue internationale était déjà répandue dans le centre de l'Afrique. Peut-être avait-il aussi prédit qu'en 1994, aura lieu au Ghana,

un Congrès réunissant les associations d'Espéranto constituées ces dernières années en Afrique Noire?.. Le récit "Voyage d'Etudes" qui vient de paraître dans le volume intitulé "SAN CARLOS", nous présente les membres d'une Commission d'études, envoyés au cœur de l'Afrique. Cette commission comprend notamment un russe Nicolas VANOF, chargé d'apprendre la langue Espéranto aux membres de l'expédition. (en librairie: 120F)





ESPERANTO - FRANCE

UNION FRANÇAISE POUR L'ESPERANTO

8a Internacia Kultura Esperanto Festivalo

ARTOJ

Provizora programo

Vendrede 12an de novembro

Festivalo de video filmoj (en la sidejo de UFE)

- Prezento de la videobendoj senditaj por la konkurso pri videobendoj
- Proklamo de la rezultoj de la konkurso
- Prezento de filmoj kaj videobendoj, i.a. la fama „Angoroj”

Komuna vespermanĝo en tipa pariza restoracio

Sabate 13an de novembro

Matene: Vizito de kelkaj tipaj kvartaloj de Parizo

Posttagmeze: En la festivalejo:

- Inaŭguro de ekspozicio: Akvareloj de J.P.Cavelan
- Koncerto de Franz-Georg kaj Rita Rössler (Germanio)
- Popolmuzikaj influoj en la eŭropa klasika muziko
- Folkloraj dancoj
- Teatraĵo „Inventante, ke mi sonĝas” aktorita de Vida Jerman (Kroatio)

Vespere: Malrokmuzika koncerto de SOLO (Hispanio)

Dimanĉe 14an de novembro

Matene: Literatura forumo gvidata de I. Ertl: la tradukita literaturo (kun partopreno de pluraj famaj tradukistoj de literaturaĵoj en Esperanto)

Posttagmeze: - Teatraĵo: „La lasta nokto de Marie-Antoinette” de usona verkisto Joseph Bush, aktorita de Julia Castiau (Belgio)

- Varietea programo: kabaredaĵoj el Francio kaj Rusio (Le Puil kaj Bronstein)

La festivalejo estos ĉi-foje en Parizo mem, relative proksime al la sidejo de UFE. Ni momente ankoraŭ klopodas aranĝi alvenon de pluraj aliaj artistoj. Definitivan programon ni poste anoncos al vi. Ĝi estos aŭskultebla sur la aŭtomata respondilo de UFE: (1) 48 87 07 42 ekde la 25a de oktobro.

Pluajn informojn vi povos ricevi ekde septembro ĉe:

Claude Nourmont, 2 Om Kläppchen, L-5682 Dalheim – Fakso (352) 67 66 02

UFE – 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004 Paris

Aliĝiloj estas haveblaj ĉe SFS.

Enirkarto por 5 spektakloj+literatura forumo:
-300 F

Rabatita prezo (UFE- kaj Jefe-anoj):
-250 F

3 spektakloj 180 F

1 spektaklo: 70 F

Literatura forumo: 20 F

Vendreda vespermanĝo:
120 F

Antaŭfestivala vizito:
40 F

Abonoj 94

Brita Esperantisto	120 F
El Popola Cinio	150 F
Esperanto	190 F
E°-actualités(5j.)	190 F
Eventoj	205 F
Fonto (literaturo)	120 F
Franca Esperantisto	180 F
Heroldo	144 F
" aerpöste	169 F
Juna Amiko	45 F
Kontakto (facila lingvaĵo)	125 F
Kulturaj Kajeroj	80 F
Espero el Koreio	82 F
Kancerkliniko	125 F
Ondo de E° (Rusio)	60 F
Lingvaj problemoj	190 F
Literatura Foiro	165 F
Literaturaj numeroj de "Franca Esperantisto"	
3 numeroj	80 F

Kotizoj UFE-UEA

UFE:

Aktiva membro (kodo FMA): 270 F paro de aktivaj membroj(Kodo PK1/PK2): 410 F
Simpla membro (Kodo FSM): 160 F Dumviva membro (Kodo FDM) : 5400 F

JEFO: (ĝis 30 jaroj)

Aktiva membro (Kodo JSM): 150 F Studento, senlaborulo (Kodo JMM): 90 F
Aktiva membro Jefe-Ufe (ĝis 30j):(Kodo JMA):270 F

UEA:

Membro kun Jarlibro (UMJ): 120 F Membro kun jarlibro kaj la revuo "Esperanto"/UMA:300 F
Dumviva membro (UDM) 7500 F Membro kun parto de la jarlibro (UMC) : 50 F

TEJO:

Membro kun jarlibro+"Kontakto"+"Tejo tutmonde" MJT 120 F
Membro " " " " + "Esperanto" MAT 300F.

Aliĝiloj al UFE kaj UEA (por apogi la nacian kaj internacian agadon) estas haveblaj ĉe SFS.

La festivalejo estos lokita en SALLE "MARTIN LUTHER KING" 32 rue Olivier Noyer, Paris 14^e (nefacila parkado por aŭtoj) (Metroo ALESIA al PERNETY, Busoj proksime 56 au 62)


Staĝoj

Leganto rimarkigis, ke ni ne donis de longe indikojn pri la staĝoj en La Chaux de Fonds. Vere, tamen ni indikis en unu el la lastaj numeroj, ke la Centro denove funkcias tutjare. Ni ne povas inventi la informojn, pri kiuj ni ne disponas! Aliflanke ni anoncas ĉiujfoje diversajn renkontojn kaj staĝojn (ekzemple ĉifoje la staĝojn de la Provenca federacio). Intertempe ni ricevis informojn pri la baldaŭaj aranĝoj de KCE. Jen ili:

KCE KULTURA CENTRO ESPERANTISTA La Chaux-de-Fonds, Svislando

Poŝta adreso:
KULTURA CENTRO ESPERANTISTA
PF 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando
Telefono: +41 (39) 267407
Estas aŭtomata respondilo ekster la dehorhoraj.

Kiel atingi nin?
Preskaŭ meze de Eŭropo, la urbo La Chaux-de-Fonds estas facile atingebla. El Genève vi veturu trajne al Neuchâtel. El Zürich, vi trajnu al Biel/Bienne. El tiuj lokoj estas trajnoj ĉiuhoraj al La Chaux-de-Fonds.



Staĝo de la 24a ĝis la 29a de Oktobro:

intensiva kurso (24 instruhoroj) je malsvisa tarifo, nur 400 FF. (+ ĉiu tranokto: 40FF en 4lita ĉambro / 1- kaj 2litaj ĉambroj ankaŭ haveblaj), manĝoj: memzorgado
Se 5 personoj aliĝas samtempe, la 6a estas senpaga!

- *****
- 30-31 X: studsemajnfino (3 niveloj)
- diskutforumo: Esperanto hodiaŭ, kaj plue?
- 27-28 XI: studsemajnfino + la historio de E^o: ĉu sinsekvo da debatoj lingvaj kaj ideaj? (C. Gacond)
- 29 XII-3 I 94: Novjara renkontiĝo, eblas partopreni parte
- *****
- Dum la baldaŭa ĝenerala konferenco ĉe Unesko en Parizo, 7 Place Fontenoy (25 X-16-XI) oni diskutos pri Esperanto (pri la rezolucio de 1985). La sekretario de la Radikala Partio (I) invitas esperantistojn manifestacii la 25an de Oktobro en Parizo. La sama partio alvokas internacie "por tuja starigo de la internacia tribunalo pri la krimoj faritaj en la eksa Jugoslavio". La kompleta teksto estas havebla ĉe SFS.
- *****



- Litova Stelo 60 F
- Monato 210 F
- " aerpoŝte 245 F
- " La Jaro 30 F
- " aerpoŝte 42 F
- Norda Prismo 75 F
- Rok'Gazet (2j.) 100 F
- Ruslanda E-isto 48 F
- Spektro 38 F
- Verda Lupeo/Feniks 90F

UFE estas peranto de ĉiuj menciitaj gazetoj. Vi povas ankaŭ aboni geamikaĵojn el nepagipovaj landoj.

UFE 4bis, R. de la Cerisaie
75004 Paris
Fakso (1)42 78 08 47
Tel (1)42 78 68 86
(ankaŭ aŭtomata respondilo tagnokte)

KKK: Kiom kostas komuniki ?

Esperantistoj ofte mencias la altajn kostojn de komunikado. "La Partio Nova" de Julio aperigas intervjuon de G. Maertens, iama prezidanto de UEA, nune direktoro de la Eŭropa E^o-centro...

La kostoj elportataj de la eŭropaj institucioj por tradukoj kaj interpretadoj sumas je 2 miliardoj da Ekuoj, por la jaro 1993. La plej granda problemo estas en la kostoj de la ŝtatoj membroj: la elspezoj, grandegaj, pro la tradukoj kaj interpretadoj ankoraŭ plialtiĝos pro tio, ke la Eŭropa Komisiono, kune kun la Parlamento kaj la Konsilio de la Ministroj lanĉis la ideon pri ĝeneraligita plurlingveco. Utopio, laŭ mi: tial ke kvindek procentoj de la civitanoj de la eŭropaj landoj, pro tiu aŭ alia kaŭzo, neniam sukcesos bone ellerni du fremdajn lingvojn.

Ni havas ankaŭ aŭtomatan kreskon de la kostoj de la varoj, ĉar la kostoj de tradukado kaj interpretado, necesaj en la industrioj, en komerco, en turismo, en la lernejoj, aldoniĝas al la kosto de la varoj, kiujn ni produktas kaj kiujn ni devas eksporti. Ni havas do, laŭ miaj kalkuloj, 105 miliardojn da Ekuoj de kostoj kaŭzitaj de tradukado kaj interpretado, kiuj plialtiĝas la bazajn prezojn kaj do reduktas la konkurenckapablon de la Eŭropa Komunumo sur la monda merkato.

La esperantistaj kialoj: kostoj de la komunikado kaj savgado al la rajto je la lingvo

Atentu ! Attention!
Estas strikte malpermesite legi la solvon de la ŝarado (sur p.14) antaŭ ol provi mem trovi solvon!
Il est formellement interdit de lire la solution de la charade avant d'avoir essayé de trouver la solution (voir p.14).

Solution de la charade à tiroirs

←

→


mon 1^o, c'est KA, parce que KA fait "olle"

" 2^o " ME " ME a ri

" 3^o " LO " LO bu e éclate

donc, mon tout: KAMELO

KRUCVORTOJ



HORIZONTALE

- I) Kolektant(o).
- II) Kuracad(o).
- III) Kanta versaĵ(o) / Sovaga aŭ kulturata umbelac(o)
- IV) s : Pagilo / r : Kiel ia marbesto.
- V) r : Mezuro / Duona vizaĝo.
- VI) Proksimul(o), duoble ! / El mino.
- VII) r : Por varmigi manon / Trinkajo.
- VIII) Ornama plant(o) / Natura akvad(o).
- IX) r : Preskaŭ nenio / Krono, krono kaj krono.
- X) Fermento / Ĉefa instigant(o), interalie.

VERTIKALE

- 1) Sciencist(o).
- 2) Ortodoksaj(o) / Senvoĉec(o).
- 3) Klareg(a) / r : Ŝirmas kaj ŝmiras nian haŭton.
- 4) Loĝej(o).
- 5) Mesur(o) / Remaĉul(o).
- 6) Malsan(o).
- 7) s : Spacoparto / Prepozicio / Tabelvorto.
- 8) Land(o) / Forflu - malforfluigil(o).
- 9) Apoteka preparaj(o)
- 10) "Dormoperant(o)"!

s : sone
r : returnite

D-ro BERTHONNEAU.

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
I	D	A	K	T	I	L	P	A	L	M
II	E	N	A	S		E	T	I	K	O
III	M	E	R	I	N	G	E	L		N
IV	O	M	A	L		A	R	A	B	A
V	N	O	V		O	T	O	N	A	K
VI	O	M	A	R	G		P	T	K	
VII	L	E	N	T	U	G		O	K	T
VIII	O	T		I	N	U	L		O	R
IX	G	R	A	M	A	T	I	K		U
X	I	O	M		L	O	K	U	S	T

Solvoj de la 125-a

Gratulojn al R. Boré, kiu solvis la lastajn krucvortojn kaj dankon al li pro la sekvanta ŝarado :

CHARADE A TIROIRS...INTERNATIONALE

* * *

Mon premier est un "aficionado"
 Mon deuxième a apprécié la plaisanterie
 Mon troisième est une boisson très dangereuse
 Mon tout: "remaĉanta mamulo ĝiba" ... laŭ P.I.V.

La venonta kulturena aperos komence de Januaro 1994. Sendu viajn kontribuojn ĝis la 19a de Decembro al la kutima adreso: SFS ĉe J. Hénin - Beaugard Rte de Montcayroux 48500 La Canourgue. Se urĝe kaj lastmomente: Tel. 66 32 86 36. Anticipan dankon !

La abontarifo de SFS restas sensanga por 94 : 30F. Cekoj estu plenigitaj laŭ la informoj de la frontpaĝo de la kulturena. Adreso de la kasistino: L. Négron 40, Chemin des Amandiers 34400 Lunel. Faciligu nian taskon, pagante frue. Bonan jarfinon! Ne hezitu kontakti SFS, se vi deziras pliajn informojn pri menciitaj eventoj.

Stefan MacGill estis unu el la instruistoj de la lasta "semajno" de Sète. La ĉi-posta enigmo estas eltirita el lia dua kajero "Tendaraj tagoj". Bonan kalkuladon!

BABELA ENIGMO

A kaj B estas urboj. Inter ili estas internacia trajn-linio. La distanco inter A kaj B estas 560 kilometroj. Du trajnoj C kaj D iras inter A kaj B. Hodiaŭ je tagmezo trajno C foriras de A je 75 km/horo kaj sam-tempe trajno D foriras de B je 50 km/horo.

Babelo estas ne-esperantista abelo. Ĝi ŝatas trajnojn. Inter la dekunua horo kaj tagmezo ĝi ripozas sur la lampo de trajno C. Sed je tagmezo, ĝi forflugas je 200 km/horo! Babelo estas la filo de Superabelo, kiu havis multajn unikajn fortojn. Inter la fortoj estas tre rapida flugado. Ĝi flugas laŭ la fervoja trako rekte al trajno D. Kiam ĝi atingas trajnon D, ĝi ne ripozas. Ĝi tuj reflugas laŭ la trako reen al trajno C.

Post du horoj, trajno C iras pli rapide: je 85 km/horo. Ankaŭ trajno D iras pli rapide: je 70 km/h. Babelo ankoraŭ flugas senlace je 200 km/horo inter trajnoj C kaj D - de C al D, de D al C, de C al D ktp. Je la kvara horo precize la du trajnoj atingas unu la alian, kaj nur en tiu momento Babelo haltas kaj ripozas.

Nun, la demando de la enigmo: Kiom da kilometroj flugis Babelo entute? *Respondo en SFS 127a*